

Honore al Kabe, 2-a parto : Intervjuo de Jean Forge
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 456, 1972.07.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj someraj elsendoj ni honoras la memoron de Kabe, unu el niaj ĉefaj tradukistoj, kiu naskiĝis en Pollando antaŭ cent jaroj.

A.- La pasintan semajnon ni raportis pri la efemera sed eksterordinara poresperanta agado de Kabe. Ni resumu niajn dirojn tiel :

Cl.- Kazimierz Bein lernis nian lingvon en 1903. Sub la pseŭdonomo Kabe, jam en 1904 aperis lia unua traduko el la pola : *Fundo de l' Mizero* de Sieroszewski. Tuj la esperantistoj malkovris en Kabe la ĝis tiam plej kapablan verkiston. En 1906 li estis elektita vicprezidanto de la Esperanto-Akademio. En 1907 li ricevis la honoran titolon « *unua stilisto esperantista* » en recenzoj pri sia traduko de *La Faraono* de Prus. Jam en 1911 li komplete malaperis el la esperanto-vivo. Tiun rompon la esperantistoj sentis kiel dizertadon kaj kiam oni parolis pri esperantisto, kiu subite kaj tute forlasis la esperanto-movadon, oni ekkutimis diri, ke li **kabeis**.

A.- Dudek jarojn post la dizertado de Kabe, esperantisto, kiu subskribas E.J.F. - verŝajne Jean Forge, iris viziti la eksesperantiston. Pri tiu vizito aperis artikolo en la revuo *Literatura Mondo*, 1931, paĝo 144-a. Jen ni citas erojn el tiu interesa artikolo :

Cl.- « *Mia koro frapegas, kiam mi staras antaŭ la ŝildeto : **Dr. Kazimierz Bein**. Tiajn teruraĵojn mi aŭdis pri li, ke mi pensas, ke ĉiumomente la pordo malfermiĝos, aperos mistera homulo kaj per majstra bokso trafos mian verdan stelon, tiel ke mi falos malsupren la ŝtuparon kaj restos mortkuŝanta kun disfrakasitaj ostoj... sed ne, miaj karaj, ne, la vizitkarto, sur kiu estas presita precize « korespondanto de Literatura Mondo – Budapeŝto », kaŭzas ke post duona minuto mi staras vid-al-vide antaŭ sinjoro Kabe !*

A.- *Homo forta, kvindekjara, ĝentila gesto, sofo, unua demando en Esperanto :*

Cl.- « *Ĉu mi povas paroli al vi Esperante, sinjoro Kabe ?* »

A.- *Lia respondo en pola lingvo : « Bone, demandu Esperante, tamen mi respondos pole, ĉar mi jam longe ne parolis Esperante kaj eble kelkfoje estus malfacile por mi... »*

Cl.- *Do ni parolas pole, kaj poste ofte interplektas Esperantajn vortojn, aŭ frazojn. Sinjoro Kabe ankoraŭ ne forgesis la lingvon...*

A.- « *Intervjuo ?* » li diras iom mirigite. « *Ĉu estas ia senco en tio, skribi pri homo, kiu iam estis fervora esperantisto kaj hodiaŭ tute forlasis la movadon ? Ĉu vi opinias ke tio estos bona legaĵo por viaj legantoj ?* »

Cl.- « *Sed sinjoro doktoro, kvankam vi ne estas plu inter ni, restas via nomo, viaj verkoj. Vi estas historia figuro, kiu jam ne vivas, kaj ni ĉiuj – precipe la literaturistoj – bedaŭras tion.* »

A.- *Post tiaj enkondukaj vortoj ni komencas interbabili...*

Cl.- *Li estas tre afabla, samideana, ni diskutas pri lingvaj problemoj dum du horoj... Junulo, reprezentanto de la postmilita movado, kaj maljunulo, eksbatalanto kaj eminentulo, sidas unu kontraŭ la alia. Kaj jen, jen mi sentas tute strange la eksterordinarecon de la momento : tra la ĉambro blovas la spirito de la jaro 1910... !*

A.- *« Dum sep jaroj mi estis esperantisto (1903-1910) kaj kvar kongresojn Boulogne-sur-Mer, Cambridge, Genève, Dresden mi ĉeestis kaj laboris dum 4 – 5 horoj ĉiutage por Esperanto ekster mia profesia okupo. La « Faraono »n mi tradukis dum duona jaro, komparante la polan originalon kun la franca traduko. Komence mi pripensis ĉu traduki « Quo vadis », sed la « Faraono » estis pli facile tradukebla. Kiam mi tradukadis, mi tradukadis seninterrompe, forlasante kaj krucsignante malfacilajn frazojn aŭ esprimojn. Ilin mi poste speciale esploris helpante min per germana, rusa kaj franca vortaroj. Sed venu kun mi, sinjoro, tuj mi montros al vi interesan restaĵon el miaj esperantistaj tempoj... »*

Cl.- *Ni trairis en lian laborejon. Mi estas scivola kaj ĉirkaŭrigardas. Li haltis antaŭ la skribtablo kaj diras :*

A.- *« Jen mia eltrovaĵo ! Tiu ĉi skribtablo jam kvarfoje estas alikonstruita laŭ mia deziro, meze la maŝino, ambaŭflanke specialaj klapoj por vortaroj kaj tradukaĵoj, la tutaĵo estas kunmetebla. Tre sprita kaj bela, ĉu ne ? Iu amiko iam skribis noveleton pri tiu ĉi mia skribtablo – la esperantisto Krukowski – kaj priskribis la ĉagrenojn de la lignaĵisto, kiu devis fabriki tian kuriozan skribtablon. La historio finiĝas en frenezulejo... bedaŭrinde mi perdis la manuskripton... »*

Cl.- *Mi volas fari kelkajn demandojn al li, sed li vigle plurakontas. Ofte li perdiĝas en detalojn, jen pri la stilo, pri sia propra vidpunkto koncerne la malperfektecon de Esperanto, jen pri personaj travivaĵoj.*

A.- *« Por havi bonan stilon, nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn, al si malparencajn. Kial ekzemple ni havis inter la slavoj tiom da bonaj stilistoj ? Ĉar ili ĉiuj scias minimume du lingvojn ! Mian simplan stilon mi multe dankas al mia rusa instruisto, kiu ne toleris du akcesorajn frazojn sinsekve. Li estis terure pedanta, sed li sukcesis alproprigi al mi facilan stilon kaj simplan esprimmanieron... Mi kredas ke la lingvo profitas pli multe per tradukado ol per libera originala verkado. La originala verkisto ĉiam iel povos « eliri » sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple ellazos aŭ aliajn donos... sed – »*

Cl.- *li interrompas sin*

A.- *« kiel ĉio ĉi povus vin interesi ? Mi ne estas plu esperantisto, tion vi nepre akcentu en via intervjuo, eĉ mi havas ideojn tute nefavorajn al Esperanto, tamen mi ne volas malkuraĝigi vin per miaj paroloj : batalu por via afero ! »*

Cl.- *Vi aŭdis eron el intervjuo kun Kabe, kiu aperis en 1931 en la revuo Literatura Mondo.*

A.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando.*

Cl.- *Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!*